


ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando

Esperantobladet

Helmikuu ♦ Februaro

1/2001



*Sarĉjo,
Pieĉjo kaj
stokholmaj
lumoj.*

FEJO-anoj en portreto.

*Riitta,
Katja kaj
Maikki.*



FEJO reviglas: nova estraro kaj aliaj, p. 25-29

Joko ilmoittauduit talvipäiville? Ohjelma s. 22 ♦ Nova rubriko: Muzike, p. 12

Esperantolehti

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; (050) 5829 248; työ/laboro: (03) 249 3313

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Seija Kettunen*

Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 ✉ kari.kettunen@pp1.inet.fi

Sekretario/Sihtööri: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Anna Ritamäki, Dragsfjärdsv. 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ✉ (02) 423 246 ✉ anna.ritamaki@kolumbus.fi

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902 ✉ ritva.sabelli@sfs.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Jussi Jänntti, Huuhankatu 14 B 8, 70600 Kuopio. ☎ (0400) 859 641

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245 ✉ markku.saastamoinen@koti.tpo.fi

Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala. ☎ (040) 518 7242 ✉ aini.vaaraniemi@pp.inet.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Officejo: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Lingvoj formortas – ĉu Esperanto?

La ĉefredaktoro de Aamulehti, Matti Apunen, skribis iutage, ke “neniu parolas Esperanton”. La eldiro aperis en artikolo, kie li tute prave emfazis la fakton, ke ĉiujare multaj lingvoj formortas. Malgraŭ emo reagi kaj ankoraŭ plian fojon klarigi, ke Esperanto tamen estas vivanta lingvo, mi ĉi-foje lasis la eldiron en sia malgranda valoro. Krome tre verŝajne temas pri la fakto, ke oni facile diras *neniu*, *neniam*, *nenie* ktp. celante fakte diri *preskaŭ neniu*, *preskaŭ neniam*, *preskaŭ nenie* ktp. Realismaj ni devas ja konfesi, ke eĉ se ni kalkulas unu milionon da Esperanto-parolantoj, tamen tio signifas nur unu sesdekonon de procento en la tuta homaro.

Lingvoj estas intime ligitaj kun kulturoj, fakte ĉiu lingvo havas sian propran kulturon. Formorto de lingvo signifas do ankaŭ formorton de kulturo. Lingvoj kaj kulturoj mortis ĉefe sub premo de aliaj lingvoj kaj kulturoj. La fenomeno estas tre kutima, eble ni diru natura, en la mondo jam dum jarmiloj. Sed en la nuntempa mondo pli kaj pli elstariĝas alia kialo: ekonomia premo. Pli frue la superregado de unu lingvo aŭ kulturo baziĝis prefere sur milita aŭ polica forto, sed hodiaŭ pli klare sur forto de mono. Pli frue la superregantoj

ankaŭ estis tre klare rekoneblaj, sed hodiaŭ – jes ĉu ni povas montri la homojn, kiuj reguladas la valoron de akcioj kaj naturtrezoraĵoj? Evidente ne. Tiu neklareco de la regantaro faras la ekonomian forton tre mistera kaj tiel ankaŭ minaca, nedirektebla.

Ofte jam estis konstatite, ke hodiaŭ oni ĉion pritaksas per mono – eĉ valoron de unuopaj homoj. Nia mondo fariĝis tute regata de mono kaj tra tio regata de tiuj, kiuj havas multe da mono. Forgesiĝas homaj, pli molaj aferoj. Tial ne estas mirinde, ke oni ĝenerale ne taksas Esperanton alte. Tre klare oni rimarkas tion jam pri la ofta demando: “kian utilon oni povas havi per Esperanto?” Ĉu Esperanto povas travivi en tia ĉi mondo, kie minacas formorto de eĉ pli parolataj lingvoj? Optimistoj diras, ke nepre post ioma tempo fariĝos forta reago kontraŭ la ekstrema mona regado. Ke tiam estos tempo de Esperanto. Sed ĉu tia reago povas naskiĝi, kiam nature aŭ mense riĉaj landoj kiel Japanio, Germanio kaj arabaj oleo-landoj subiĝas al la regado de anglosaksaj landoj? Ni devos vivi por vidi kaj uzi nian lingvon, ĉar nur neuzataj lingvoj formortas.

Jukka Laaksonen

Per paca armilo en nova jarmilo

Tiom UEA vastiĝis tra la mondo ke la tradicia nov-jara mesaĝo devus esti sendita plurajn fojojn tra la jaro. Multaj el niaj membroj festas la novan jaron nun, sed ekzistas ankaŭ multaj kiuj festas ĝin post kelkaj tagoj; aliaj, kiuj festas ĝin en marto aŭ septembro; aliaj, kiuj nun festas ne la novan jaron sed Ramadanon; kaj certe eĉ aliaj. Ĉiukaze, pro respekto al la tradicio, ni restu ĉe la komenco de la kristana kalendaro.

Novjara mesaĝo estas okazo por pritaksi kun kritika distanco la evoluon dum la pasinta jaro kaj por esprimi dezirojn pri la evoluo en la posta jaro.

La Esperanto-movado dum la jaro 2000 daŭrigis sian kutiman kreskon. Ne lasu ke misgvidu vin la membro-nombro de ĉi tiu aŭ de aliaj organizaĵoj. En efektiveco, ĉi-momente Esperanto kreskas, foje eĉ tumulte, en regionoj kiuj ne eniras la bon-konduktan cirkon de la ok plej industriaj landoj en la mondo. Ekster tiuj ok landoj esperantistoj apenaŭ povas revii pagi kotizojn aŭ aĉeti librojn eldonatajn en tradicie fortaj bazoj de la movado. Defio staras antaŭ UEA kaj la ceteraj organizaĵoj: ĉu ni sukcesos trovi manierojn enplekti ĉiujn homojn en la vivon de Esperantujo? Nia himno nenie asertas ke la flugiloj de facila vento devas porti la novan senton nur de riĉa loko al riĉa loko.

Se vi do vivas en lando kie ne estas problemo pagi la kotizon de individua membro, bonvolu fari tion. Per tio vi helpas ĉiujn agadojn de UEA (ekde disvastigo de Esperanto inter la junularo aŭ en la Interreta mondo ĝis helpo al la movado en Afriko aŭ Nepalo). Jen kiel, fakte, oni elspezos la monon

de via kotizo. Krome, vi aliĝos al la rondo de la esperantistoj plej bone informataj per la plej legata Esperanto-revuo, kaj vi estos inter la plej favorataj partoprenantoj de Universalaj Kongresoj, aĉetantoj de libroj kun rabatoj ktp.

Estas nun finiĝanta Kampanjo 2000, kiun sindediĉe sekvis la esperantistaro en multaj landoj. Ĝi portis kelkajn sukcesojn, dum ĉe iuj agad-flankoj progreso forestas. UEA, kiel reprezentanto de la monda esperantistaro, regajnis ĉiujn ŝanceliĝintajn poziciojn ĉe internaciaj organizaĵoj, kiel UN kaj Unesko kaj aliaj ankoraŭ, kaj ĝuste en la dua duono de la jaro 2000 atingis pliajn rezultojn. Esperantistoj estis petataj prelegi en Unesko mem al la tuta mondo de neregistaraj organizaĵoj. Neniu ridetis kaj neniu primokis, multaj eĉ petis rilati kun ni. Same okazas en UN, kie, dank' al la refortigita Novjorka Oficejo, oni komencas ricevi de pluraj flankoj subtenojn por la rezolucio de la Seŭla konferenco de NRO-j (1999), kiu postulas ke UN finfine alfrontu la problemon de lingvaj homaj rajtoj kaj la eblan solvon pere de neŭtrala lingvo.

En ĉiuj kontinentoj esperantistoj komencas funkciigi ĉiam pli sukcese siajn kontinentajn aŭ landarajn Esperanto-asociojn, -uniojn kaj -komisionojn. Mi ne povas ne mencii la amerikajn kaj aziajn kongresojn, kiel brilajn ekzemplojn de tio kion oni faras. Mi ne povas ne mencii la revigliĝon de Eŭropa Esperanto-Unio, kiu eble siavice revigligos kelkajn Esperanto-agade marĝenajn eŭropajn landojn. Mi certas ke eŭropaj esperantistoj kapablos ĝis maksimumo ekspluati la

eblojn kiujn prezentas la Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001, por montri al la mondo, kiu vere volas subteni plurlingvecon kaj sekurigi la plu-ekziston de naciaj lingvoj.

Apud la tradiciaj rimedoj por Esperanto-agado pli kaj pli ekspansias io nova: Interreto. Estas vere mirinde konstati kiel rapide esperantistoj sukcesis adaptiĝi al ĉi tiu moderna komunik-rimedo kaj utiligi ĝin por Esperanto. Tiu kampo certe prezentas al ni multajn eblojn (mi ne kaŝu de vi ke multaj novaj esperantistoj en multaj malnovaj landoj varbiĝas pere de interretaj kursoj). UEA kaj la ceteraj organizaĵoj devus, laŭ mi, iom pli kuraĝe plonĝi en ĉi tiun maregon, kie oni trovas amason da junaj kaj interesaj homoj. Ĝuste tiajn homojn ni bezonas.

Ĉar ni parolas pri junaj homoj, estas oportune mencii la labor-streĉojn de nia junulara sekcio TEJO, kiu rekomencas produkti novajn ideojn kaj novajn sukcesajn agadojn. Mi apelacias al ĉiuj legantoj de ĉi tiu mesaĝo, junaj kaj maljunaj, ke ili klopodu superi organizajn kaj aĝajn limojn kaj antaŭenigi kunlaboron. Ĉiu plia novjara mesaĝo fakte portas nin pli proksimen al la momento kiam la TEJO-homoj devos transpreni la torĉon (kaj mem verki siajn novjarajn mesaĝojn). Same mi petas ĉies kunlaboron por ILEI, nia instruista brako. Apenaŭ necesas diri ke kie oni ne instruas Esperanton, oni ne kreas esperantistojn. Instruado havas fortan lokon en la nun diskutata nova laborplano de UEA.

Mi ne povas fini ĉi tiun mesaĝon sen du lastaj konsideroj.

Niaj fakaj asocioj devas fortiĝi, por apliki Esperanton en la praktiko. Nur kiam Esperanto estos lingvo per kiu oni povas aĉeti kamionon en Eŭropo kaj sendi ĝin al Afriko, tiam Esperanto komencos esti vere normale internacia lingvo.

Mi parolis pri kamionoj kaj komercado, sed ne estas malsame pri spiritaj kaj kulturaj varoj. Kiel ĉiam okazis en la pasinteco, ekzistas fortoj en la mondo kiuj postulas rezigni je demokratio favore al ekonomia efikeco. Ne estas strange ke tiujn ideojn subtenas ĉefe tiuj kiuj estas (aŭ esperas esti) ekonomie fortaj. Ni apartenas, laŭ mi, al la alia flanko, al tiuj kiuj postulas ke la homo estu en la centro de la atento, kiuj pensas ke ekonomia evoluo havas sencon nur se ĝi plifeliĝigas, ne se ĝi mortigas la homon per malsanoj aŭ detruante lian mondon. Ni postulas ke ankaŭ en la lingva kaj kultura kampo estu demokratio, ke neniu humiliĝu kaj submetiĝu. Tion ni diru laŭte kaj klare en ĉiuj forumoj en kiuj ni havos la eblon paroli dum la venonta jaro. Interne de la movado, ĉiuj bonvolu partopreni la diskutojn pri la laborplano, kies slogana resumo estas ĝuste: Al lingva demokratio!

Bondezirojn al vi kaj al Esperanto en la jaro 2001-a.

Kep Enderby

Fonto: Gazetaraj komunikoj de UEA, n-ro 110

Esperanto en 2000

Verkante revuon de la jara aktivado mi foje pensas, ke eble estus preferinde skribi simile al malnova rusa kronikisto: ”En ĉi tiu jaro okazis nenio”. Sed ĉar la organizantoj de la Zamenhofa Tago en Jekaterinburg ĉiujare petas min rakonti pri la plej interesaj eventoj kaj tendencoj en Esperantujo dum la pasinta jaro, mi cedas al ilia insistado. Ja la tradiciaj panoramaj artikoloj similas al la tagĵurnaloj kiuj, laŭ Karel Ĉapek, ”ĉiumatene aperas, eĉ se dum la antaŭa tago okazis absolute nenio”.

Sed oni ne povas diri, ke okazas nenio en Esperantujo, baze difinebla kiel aro da dise loĝantaj homoj, kiuj fordonas al Esperanto parton de sia libertempo. Kvankam laŭnombre Esperantujo ne superas urbon kun cent mil loĝantoj, ĉiujare en ĝi okazas centoj da diversspecaj renkontiĝoj, funkcias kelkaj miloj da klub(et)oj kaj asocioj, aperas multaj gazetoj kaj libroj.

Malpli amase

Malgraŭ la nestabila situacio kaj eventuala bojkoto, UEA decidis kongresi en Tel-Avivo, kaj ĉi tiu kongreso iĝis la malplej amasa UK de la lasta jardeko, eĉ malpli granda ol la Aŭstralia UK (1997). Bedaŭrinde, partoprenis neniu esperantisto el la arabaj landoj, kie UEA provas organizi kampanjon, kaj la postkongresa rebrulo de la konflikto en la regiono verŝajne rapide forgesigis, ke “pacaj batalantoj” ĉi-jare unuafoje kongresis en la Sankta Lando.

Malpli grandaj ol kutime estis ankaŭ la kongresoj de TEJO (Hongkongo) kaj SAT (Moskvo), kiuj logis malpli da personoj ol, ekzemple, la fervojista kongreso en Buda-

peŝto, landaj kongresoj en Brazilo, Japanio kaj Litovio, junulara festivalo apud Venecio kaj ĉiu el la du jar-ŝanĝaj renkontiĝoj en Germanio.

La magreco de tiuj kongresoj ŝrumpigis la membronombro de la organizintaj asocioj. Unuafoje post 1986 la individua membraro de UEA ne atingis 7 mil. La membraro de TEJO falis sub 700, kaj SAT raportis pri nur 930 anoj. Supozeble en 2001 la kongresoj en pli allogaj landoj (Kroatio, Francio, Hungario) plimultigos la kongresanaron kaj la membraron, tamen la membrokrizo devas atentigi la asociajn responsulojn pri pli adekvata interna politiko.

Cetere la 4a Eŭrop-Unia kongreso estis sukcesa kaj kvante kaj kvalite – Esperanto plu restas plej disvastigita ĝuste en Eŭropo.

Kion ni diskutas?

Efektive, en Eŭropo loĝas pli ol duono da membroj de UEA kaj SAT, ĉi tie kutime okazas iliaj kongresoj. Aliaj internaciaj asocioj, ekzemple OSIEK kaj LF-koop, ankorau neniam okazigis siajn ĉefajn aranĝojn ekster Eŭropo. La agado de ERA, EEU kaj diversaj sendependaj iniciatoj (precipe la informa aktivado de Dafydd ap Fergus) metas en la tagordon la demandojn pri pli kunordigita agado en Eŭropo, interalie pri malfermo de oficejo en Bruselo. Probable pro la Eŭropa jaro de lingvoj (2001) ”Esperanto en Eŭropo” plu restos la ĉefa diskutemo en Esperantujo. La alia ofte traktata temo en 2000 estis la evoluo kaj strategio de la esperantista komunumo, kiu devas ŝanĝi sin adapte al la rapide ŝanĝiganta mondo, por ne iĝi areto de kuriozaj manietuloj.

En Tel-Avivo estis lanĉita diskuto pri la nova strategio de UEA, kiu daŭrigos Kampanjon 2000 (ĉu tiu estas plenumita?) Tamen la publikigita projekto apenaŭ serioze konsideras la berlinan proponon de Enderby laŭ kiu UEA iĝus "asocio por la homaj rajtoj, kiu uzas Esperanton, kaj kies politiko estus disvastigi Esperanton pli forte ol nun pere de ĉefa pledo pri homaj rajtoj aŭ, se vi permesas, civilaj liberecoj".

Se temas pri la homaj rajtoj, la rajtojn de la esperantistoj intencas defendi la Esperanta Civito, kiu fondiĝos en junio 2001. Kvankam ĝuste la Civito estas inspirata de raŭmaj ideoj, la ĉefa omaĝo al la Manifesto de Rauma (1980) okazis en ties naskolando Finnlando kadre de seminario "20 jaroj post Raŭmo" preparita de Jouko Lindstedt, unu el la tri kunaŭtoroj de la dokumento, kies tezoj estas diskutataj ĝis nun.

44 jarojn post la Principaro de Frostavallen, UEA pretigis Gvidliniojn por informado pri Esperanto. Malkiel la antaŭa dokumento, ĝi ne listigas la ĉefajn erarojn en informado, nek donas konsilojn pri insignoj kaj vestaĵoj, sed proponas "konsciigi la publikon pri la ekzisto de lingva neegaleco kaj pri la ekzisto de tutmonda, egalece funkcia lingvokomunumo, en kiu ĉiuj bonvenas". Ĉu komenciĝas distanciĝo de "dua lingvo por ĉiu" kaj konceptado de Esperanto kiel la ĉefa komuniklingvo ene de nia malgranda grupo kun propraj tradicioj kaj interesoj?

Ekstere

Sendepende de la respondo al ĉi tiu demando UEA daŭrigas sian eksteran agadon, precipe inter neregistaraj organizaĵoj. Ĝi reprezentigis, interalie, en Jarmila Forumo de NROj, Konsulta Komitato de Unesko por Lingva Plureco kaj Multlingva Eduko,

Kongreso de Internacia Asocio de Edukistoj por Monda Paco kaj en kolokvo "Kulturo de paco: aganta ideo". Eŭropa Esperanto-Unio lanĉis proponon pri Konstanta konferenco pri la lingvoproblemo en Eŭropo. Esperantistoj (kun)manifestaciis sur stratoj de Parizo kaj San-Paŭlo.

Sed eble la plej interesaj eksteraj iniciatoj estas projektoj Indiĝenaj Dialogoj kaj Interkulturo (al ĝi aliĝis jam cent klasoj) kaj la movado por Lingvaj Festivaloj. Tiujn festivalojn okazigas junularaj Esperanto-grupoj por prezenti diversajn lingvojn kaj iliajn kulturojn – kompreneble, kun emfazo de Esperanto.

La kultura jaro

Kvankam la movadaj kongresoj de UEA, SAT kaj TEJO ĉi-jare ne povas esti nomitaj sukcesaj, tiun epiteton meritis la du festivaloj de la Esperanto-kulturo en Francio (KAFE) kaj en Finnlando (KEF). Precipe multajn pozitivajn reagojn vekis KEF 2000 en Helsinki pro la elstara programo muzika, poezia kaj teatra, kaj pro la entuziasmiga etoso reginta dum ĝi. Ĝuste antaŭ la festivaloj "Vinilkosmo" finrealigis sian projekton "Kolekto 2000" de dek K-diskoj kun junulara muziko. Kaj en Moravia filharmonio estis prezentita Esperanta Simfonio de David Gaines por mezsopranulino kaj orkestro.

Plu aktivas eldonemuloj. Surmerkatiĝis gravaj tradukoj: "La lada tambureto" de Gunter Grass, "Resurekto" de Lev Tolstoj, "La hobito" de Tolkien, "La ŝaŭmo de l' tagoj" de Boris Vian. Inter la originale verkitaj libroj estas menciendaj "Surklifa" de Serĝo Elgo kaj "Neniu ajn papilio" de Trevor Steele (laŭreato de OSIEK-premio pro alia libro).

Tiuj aferoj nun ŝajnas preskaŭ same ordi-

naraj kiel UKoj, sed ne necesas forgesi, ke en la epoko de "vinilaj diskoj" oni simple ne havis popularan dancmuzikon en Esperanto kaj ke dum 1950-79 (tridek jaroj) estis eldonitaj malpli ol 20 romanoj originale verkitaj en Esperanto.

Gazete

Sed la kultura gazetaro ne progresas. Plu falas la abonantaro de "Kontakto". Post la malapero de "Iltis-Forumo" kaj "Riveroj" ĉesis aperi "Kulturaj Kajeroj", kaj aŭtune Esperantujon konsternis informo pri tio, ke ekde 2001 "El Popola Ĉinio" aperos nur elektronike.

Pro la paŭzo de "La Brita Esperantisto" (eble la plej leginda nacia Esperanto-gazeto en la jaroj 1990aj) la Estraro de EAB decidis ke al la membroj de la asocio estu provizore sendata "La Ondo de Esperanto". Dank' al la nova redaktoro, Stano Marček, "Heroldo de Esperanto" plibonigis siajn enhavon kaj aspekton.

La movadaj gazetoj evoluas en konkurenco kun la kreskanta ret-informado, per kiu rapide kaj nemultekoste (ofte senpage) estas disvastigataj novaĵoj kaj opinioj. Pli ol du mil esperantistoj jam registriĝis en la publike atingebla adresaro, kaj supozeble pli multaj uzas la reton sen anonci sin (por eviti nebezonatajn informojn). Sed krom kunigi la homojn Interreto ankaŭ disigas ilin. Ekzemple, multaj ret-aktivuloj ne atentis la aliajn aplikosferojn de Esperanto. Krome, nur rete disvastigata materialo (ekzemple, pri kelkaj Esperanto-renkontiĝoj) ne atingas la pli grandan parton de la esperantistaro, kiu ne havas ret-aliron.

Menciendaĵoj

– Antaŭ la Tel-Aviva UK, en Amano UEA okazigis sian unuan seminarion por

arabaj esperantistoj.

- En Britio ekagis Esperanto-partio.
- "Pasporta servo" unuafoje listigis pli ol mil adresojn.
- Reaktiviĝis Pola Esperanto-Junularo.
- Kastelo Greziljono kaj Esperanto-redakcio de Radio Aŭstria Internacia sukcesis daŭrigi sian agadon malgraŭ malfavoraj cirkonstancoj.
- Fondiĝis Astronomia Esperanto-Klubo, kiu jam okazigis fakan seminarion kaj eldonis jaran almanakon.
- En Torun (Pollando) okazis la jubilea 20a Internacia renkontiĝo de popolaj orkestroj.
- "Yomiuri Shinbun", "USA Today" kaj "The Times of India", ĉiu kun milionoj da legantoj, pozitive informis pri Esperanto.
- Ekde marto Barbara Pietrzak eklaboris, post Andrzej Pettyn, kiel estro de la Esperanto-redakcio de Pola Radio.
- William Auld iĝis laŭreato de la 7a Esperanto-Kulturpremio de Aalen.
- Ne unu, sed tri personoj (Hans Bakker, Jouko Lindstedt, Mauro La Torre) estas proklamitaj kiel la Esperantistoj de la Jaro 2000.



Enirante en la trian jarmilon ni memoru pri la samideanoj, kies vivo ĉesis en la pasinta jaro. Por ĉiam forlasis nin Martha Andreasson, Zsuzsa Barcsay, Ingemund Bengtsson, Stanislava Chrdlova, Ruediger Eichholz, Thomas A. Goldman, Jiri Karen, Leopoldo Knoedt, Karl Maier, Jan Stronne, Anton Zacharias kaj aliaj meritplenaj esperantistoj.

Foriras la malnovaj generacioj, venas la novaj. Laŭ Kep Enderby "eĉ se la revoj de niaj pioniroj pri Rapida Fina Venko ankoraŭ ne realiĝas, oni rajtas honeste kaj memfide diri ke la fenomeno Esperanto sendube suk-

IF en Trier pri infanoj

Pli ol ducent parolantoj de Esperanto kolektiĝis en Trier, Germanio, por ĝui la kulturon de sia lingvo en la 17-a Internacia Festivalo ekde la 27-a de decembro ĝis la 3-a de januaro. La ĉi-jara ĉeftemo estis “Esperanto kaj infanoj”, kaj sekve ankaŭ inter la partoprenantoj tutaj familioj kun infanoj kaj beboj multis pli ol kutime.

Pri la altkvalita programo por infanoj kaj gejunuloj respondecis ĉefe Christoph Frank, profesia magiisto kaj pupteatristo, kiu laboregis dum la tuta semajno: li kaj prezentis proprajn vesperajn spektaklojn kaj partoprenigis la infanojn mem en diversaj ludoj kaj teatraĵoj. Pli faktece prilumis la ĉeftemon en siaj prelegoj al membroj de la komisiono por Rondo Familia de UEA.

La programo por la plenkreskuloj enhavis i.a. studadsesion de Akademio Internacia de la Sciencoj kaj plurajn unuopajn prezentojn pri plej variaj temoj, de tradiciaj japanaj kalkuliloj ĝis diversaj gimnastikoj kaj sportoj. Infanoj kaj plenkreskuloj povis kune lerni diversajn manlabor-

ojn, ekzemple triki ludbestojn, faldi paperon origame aŭ munti fotojn. Tute Esperantlingvan diskovesperon aranĝis la korifeo de nia populara muziko Floréal Martorell.

Nia familio – la gepatroj kaj tri malgrandaj infanoj – partoprenis Internacian Festivalon la duan fojon, kaj ĝia Silvestra Balo jam ŝajnas al ni la plej bona Esperanta maniero akcepti ĉiun novan jaron. La 18-a IF okazos ĉirkaŭ la jarŝanĝo 01/02 en Magdeburg. Informoj riceveblas de Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio (rete: HDP@internacia-festivalo.de).

Jouko Lindstedt

cesis vivteni sin kaj progresi dum tiu ĉi tumultega jarcento – atendi pli estis utopie kaj tro optimisme.”

De ni, nuntempuloj, dependas la estonteco de Esperanto. Se ni faros nenion, pri Esperanto memorigos eble nur muzeoj, bibliotekoj kaj la subneĝa Mesaĝo por venontaj generacioj, metita en Antarkto la 27an de aprilo

2000 memore al Monda Scienca Pintkunveno – dank’ al aktivuloj de Argentina Esperanto-Ligo unu el la kvin lingvoj de la mesaĝo estas Esperanto.

Aleksander Korĵenkov (Ruslando)

Fonto: La Ondo de Esperanto. 2001: 1 (75)

Novajoj de la internacia kulturcentro Caisa

– La urbo Helsinko absurde maldungas 31 laborantojn de Caisa –
– Apartaj laŭdoj por KEF 2000 –

La internacia kulturcentro Caisa en Helsinko estis scenejo de multaj esperantaj eventoj dum la pasintaj du jaroj: koncertoj, poezio de Anja Karkiainen, KEF 2000 kaj ĝiaj plankunsidoj. Ankaŭ la Aŭtunaj Tagoj 2001 okazos en Caisa.

Intertempe multaj el ni esperantistoj jam bone konatiĝis kun la lerta kaj afabla personaro de Caisa kaj nia kullaboro bonege fluis. Ni trovis en Caisa profesian helpon por organizado de eventoj kaj partneron kun similaj ideoj kaj celoj kiel la niaj: renkontiĝo de diversaj kulturoj.

En la revuo "Caisan Syke" (3/2000), skribas la estrino de Caisa, Tuula Meres-Wuori, sekve:

*"Kohtaamisesta kumppanuuteen" on tämän vuoden messujemme teemana. Kulu-
nutta kesäkauttamme ovat sävyttäneet eri kumppanuuksien kohtaamiset... Sen sijaan arkipäivän yhteiselo ei vierailijalle helposti avaudu. Kohtaavatko kulttuurit eri puolilla kaupunkia? Luodaanko kumppanuuksia?*

Hyvä esimerkki kumppanuudesta olivat keskuudessamme viikon festivaalia pitäneet esperantistit. Kommunikointivälineenä kieli, joka ei ole kenenkään äidinkieli, tuntui muodostavan aivan erikoisen tiiviin ja harmonisen yhteenkuuluvaisuuden tälle kansainväliselle joukolle. Monipuolinen, vuorokauden ympäri jatkunut ohjelma löysi ajallaan osallistujansa eri puolilta Kaisaniemeä. Ohjelman vetäjät palkittiin raikuvien aplodein.

Varsin kannustavaa kumppanuutta."

La ĉefartikolo aperis trilingve, finne, svede kaj angle.

Bedaŭrinde ĉi aŭtune tre malagrablaj novaĵoj pri Caisa atingis nin. La urbo Helsinko maldungos 31 laborantojn de Caisa. La unua duono jam foriris jarŝanĝiĝe kaj la dua duono lasos sian laboron majofine. Inter ili estas praktike ĉiuj al ni konataj kunlaboraj personoj. La kialo: Ŝparo por la urbo. Maldungi la jam spertajn kaj dungi novajn personojn per por-senlaborula ŝtata subvencio signifas ŝparojn por la urbo. Jen ne nur absurdega, sed plene skrupula labora politiko!

Skribas Tuula Meres-Wuori en "Caisan Syke" (4/2000):

Tahtoa ja taitoa meiltä ei puutu, resursseja sitäkin enemmän. Ilman pysyvämpää henkilöstöä on pitkäjänteinen kehittäminen vailla pohjaa. Puhumattakaan niistä inhimillisistä kärsimyksistä, joita ammattitaitoisien ja motivoituneen henkilöstön työsuhteiden luonnoton katkaiseminen aiheuttaa. Vain menetyksiä koituu myös työnantajalle käyttämättä jääneestä tietotaidosta.

Reagan leteron al la urbo Helsinko pri ĉi situacio sendis EAF, EKH, FEJO kaj KEF-teamo.

RH

PS. Kun la interesa programo de Caisa vi povas konatiĝi rete en <www.kulttuuri.hel.fi/caisa>. Ankaŭ Caisan Syke legeblas ĉi adrese.

PRI

Koska numerossa 6/2000 käsitellyt prepositiot DE ja EL usein vastaavat suomen STA/STÄ-päätettä, niin otetaan nyt vielä PRI-prepositio, joka sekin usein vastaa STA/STÄ-päätettä. Lyhyesti sanottuna ero on se, että PRI kertoo aiheesta, teemasta, sisällöstä, kun DE on mm. suunnasta ja EL ”pois jonkin sisältä”. Kun joskus haluaa tarkentaa, onko ”miehen tarina” tarina jonka mies kertoi jostain aiheesta (*la rakonto de la viro pri io*) vai tarina jostain miehestä (*ra-konto pri iu viro*), niin voi olla hyvä muistaa sekä PRI että DE. Samoin ”naisen valokuva” voisi olla kuva naisesta (*foto pri la virino*) tai naisen omistama kuva (*la foto de la virino*).

Tavallisimpia sanontoja joissa PRI-sanaa tarvitaan on kun puhutaan, kerrotaan, kirjoitetaan tai kuullaan jostain asiasta tai henkilöstä: *paroli/rakonti/skribi/aŭdi pri io aŭ iu*.

On myös adjektiiveja joiden jälkeen tulee PRI: *kontenta/certa/ĝoja/konscia pri io* (tyytyväinen/varma/iloinen/tietoinen jostain). Aina ei suomessa kuitenkaan ole STA/STÄ, vaikka esperantossa on PRI: *Mi pensas pri vi*. Ajattelen sinua.

Usein näkee, että PRI on pantu verbin eteen:

Priparoli la problemon = paroli pri la problemo. Prisilenti la aferon = silenti pri la afero, vaieta asiasta. *Priplori la perditan amikon*, surra/itkeä menetettyä ystävää.

Joskus olet ehkä ihmetellyt miksi toisinaan on *priŝteli* ja toisinaan pelkkä *ŝteli*, kun molemmat kuitenkin tarkoittavat ”varastaa”. Tässä vastaus: pelkän *ŝteli*-verbin jälkeen tulee se mitä varastetaan akkusatiiviin; *pri-ŝteli*-verbin jälkeen tulee akkusatiiviin hen-

kilö jolta varastetaan.

La malhonesto servisto priŝtelis sian mastron. Epärehellinen palvelija varasti isännältään. *Li ŝtelis monon de la mastro*. Hän varasti isännältä rahaa.

Ja lopuksi pähkinä. Mikä suomalainen sananlasku vastaisi esperanton sananlaskua *Pri havo najbara oni estas malavara?* Se voi olla vaikeampi kuin tämä: *Pri la lupu rakonto kaj la lupu renkonte* eli Siinä paha missä mainitaan (tarkasti: sudesta kertomus ja susi vastassa).

Saliko

Malka suomalaisen silmässä

Kielten ja kielioikeuksien vuonna haluan muistuttaa, että vaikka suomalaiset kärkeästi puuttuvat heistä kaukana oleviin kieliristiriitoihin, niin yleensä täällä tiedetään hyvin vähän oman maan kielivähemmistöistä ja niiden kohtelusta. Saamen kielet ohitetaan kuin ei niitä olisikaan. Vanhempi kirjallisuushistoria esittelee saamelaista kohdettaan väheksyen ja ulkopuolisesti. Äskettäin on kuitenkin ilmestynyt kaksi kirjaa, jotka saavat lukijan pyyhkimään roskaa silmistään. Elina Helanderin ja Kaarina Kailon *Ei alkua ei loppua, saamelaisten puheenvuoro* (260 s.) koostuu haastatteluista (kustantaja Like) ja on ilmestynyt myös englanniksi Kanadassa. Siinä meillä oma *Indiĝenaj dialogoj!* Saamelaisneuvosto on julkaissut ensimmäisen kolmikielisistä (saame, suomi, norja) saamelaista kirjallisuutta käsittelevistä viikkosistaan, joka auttaa kömpimään sisään saamen maailmaan. Onko näistä paljonkaan näkynyt valtaa pitävissä tiedotusvälineissä? Olisi syytä tutustua!

Saliko

Esperanto Desperado Brokantaĵoj

– Malfacile klasifikebla muziko
kun fortaj etnaj influoj –

Antaŭ la julo aperis disko de Esperanto Desperado, "Brokantaĵoj", eldonita de Vinilkosmo. Esperanto Desperado ja estas dana-pola-bosnia bando, kies membro, Kim Henriksen estas konata jam de la legende pionira esperanta rokbando, Amplifiki. Tiel kelkaj pecoj sur tiu disko estas "brokantaĵoj" kantoj de Amplifiki, i.a. fam-ega "Sola" troviĝas sur ĉi disko.

La bando konsistas el Thomas Crowfurd (drumisto), Brian Laustsen (basisto), Helle Eble Cleary (flutisto) kaj el Kim Henriksen kaj Amir Hadzi-ahmetovic, kiuj du ĉefe respondecas pri la muziko kaj tekstoj, ankaŭ pri la kantado. Kimo krome ludas akordeonon kaj Amiro gitaron.

Dum longa tempo oni jam aŭdis "Espo Despo":n koncerte en diversaj renkontiĝoj. Speciale la bonetosa kaj danciga KEF-koncerto surprizis kaj ravis la publikon. Tiel la diskon oni jam tre atendis.

Katja, Pipsa, Hipo, Pieĉjo, Jukka, Eeva, Anna, Tiina kaj Riitta kune aŭskultis la diskon kaj multon opiniis.

"Mi havas la antaŭjuĝon, ke estas bona"

"Bonege, ke ankaŭ Amir faras pecojn kaj kantas"

"Klaraj etnaj influoj, ĉu? – Ĉu sonas turke aŭ bosnie aŭ kiel?"


"Oni povas nomi ĉi muzikon nek roko nek popo. Mi ne scias. Eble "pirata" muziko?"

"La kovrilo estas tre bela. – Ĉu pro la viroj?"

"Hej, ĉi tiu peco estis bonega en KEF-koncerto, sed ĉi tie io mankas. Iu forto, akreco, frenezo aŭ vivo – mi ne scias kio – sed pli bone sonas vive en koncerto. Kvazaŭ oni ne tute kuraĝus ĉi tie..."

"Jes, la etoso ne tute bone periĝas. Estas klare muziko, kiun oni devus aŭdi vive kaj drinkeje ĉe bierglaso."

"Sed ĉu eble influas tion la frida etoso de surbendigejo? Manko de publiko? Ĉu ili ne



kutime ludas en trinkejoj?"

"Funkcius tamen bone en aŭtoradio... Radio Suomi ofte ludigas ĉi tipan muzikon"

"Mi ne certas, kiel oni surbendigos ĉi tiun diskon, ĉu ĉiun instrumenton unuope, sed ĉi tian muzikon oni prefere devus surbendigi dum koncerto. Pli bone funkcius."

"Sed ili fakte ludas bone."

"Tiu ĉi sonas iom 70-jarece....kvazaŭ ia filmmuziko..."

"Ĉu ne estas iom tro diversstilaj pecoj

unudiske? – Laŭ mi ne!”

”La akordeono kaj la fluto estas bonegaj! Tre belaj!”

”Ĉu tiu ĉi nun estas Amir aŭ Kim? – Amir, tutklare. Se estus Kim, aŭdeblus ie meze subita krio.”

”Aj, jen bonega peco!”

”Ĉu vi rimarkis, ke ĉi tiu teksto estas verkita de la patrino de Kim?”

”Estas unu el la plej bonaj espobandoj.”

”Mi ne ŝatas, ke la voĉo ĉi tie estas ĉi tiel prilaborita. – Ĉu? Mi ŝatas ekzakte tion.”

Dum la aŭskultado unu el ni laŭte kunkantas ”Sola”. Alia konstante saltodancas side. La ceteraj restas pli trankvilaj kaj senmovaj. Niaj klaraj favoritoj estis balade bela ”Feliĉe” kaj danciga ”Ska-virino”.

Esperanto subgrunde kompil’

Ni supozu, ke vi estus muzikisto. Vi sentus bezonon verki protestan pecon. Iu mondpolitika okazaĵo vin tre skuus. Vi emus esprimi vian malŝaton al iu ŝtato pro fi-ago. Vi vortumus sekve: ”Lando avara, lando malŝatata, frakasas la personojn, mortigas senbezone, Usono fuck you ” (Esperante: ”Usono, fikiĝu”, sed la originala ĉefmesaĝo angle, por ke ĝi trapenetru la koncernajn). Kian muzikon vi elektus por ĉi akra vortumo? Ĉu melankolian gitarbaladon? Ĉu gajan popon? Ĉu popolmuzikon? Aŭ ĉu eble plej taŭgus plenbrue forta subgrunda muziko?

Pri tiaspeca hardkora punkmuziko temas en kompilaĵo ”Esperanto Subgrunde”. Homo, kiu ne kutimas aŭskulti tian muzikon nomus ĝin verŝajne malpli fake oreldetrua



bruo kaj krio.

La disko estas kunlabora projekto de Vinilkosmo kaj brazila La Blua Papilio, aperis en 2000 kaj konatigas nin kun 15 bandoj. Ĉefe bandoj francaj kaj brazilaj, sed ankaŭ kanadaj kaj rusaj subgrunduloj troviĝas ĉi K-diske. Kelkaj el la bandoj estas jam konataj por espistoj (Araukana, Piĉismo), la plejparto ne. Parte estas originale esperantaj pecoj, grandparte tradukitaj pecoj. Pri la tradukoj respondecis imponaj tradukistoj kiel Ĵak Le Puil, Jorge Camacho, Liven Dek, Rikardo Cash. La diskokovrilo estas iom Dali-ece okulplaĉa kaj bone enkondukas en la koloran absurdon de subgrunda muziko.

La tekstoj estas jen socikritikaj –

”*Polica ‘stas la mond’ / ja vidu apud vi / nur furzu iom tro / armeo tuj staras ĉe vi*”
(Valsistinoj/ La homo kiel la simio)

– jen anarkiemaj –

”*Nek dioj, nek estroj / Nek profitoj, nek komercoj / UUUUHH / Anarkio...*”

(Stomaka korodo/ Nek mastoj nek dioj)

– jen parodiaj –

“*Fingrumas Brandon Brenda-n / Sin drogas Kelly-a patrin’ / Kaj se Steve ne prancas / Tuj buŝumas Brenda lin / Beverly Hills! Beverly Hills! / Ĉie nur putinoj en Hollywood’...*”

(La Bestoj/ Beverly Hills)

Denove, la teksta parto estas verŝajne iom ŝoka por homo, kiu pli kutimas al muzikaj amoj kaj floroj kaj feliĉoj. Ankaŭ la nomoj de la bandoj respegulas ĉi anarkieman mon-

don: La Drinkomaniuloj, Toksa Frenezo, Averta al gepatroj, Piĉismo...

Iom min surprizas, ke kelkaj el la tekstoj tute ne sekvas ĉi linion, sed estas pli tradicie amkantecaj aŭ naivete mondpacemaj. Ia malkongruo inter teksto kaj muziko?

Kies animo suferas jam pro ordinara rokmuziko, fajfu pri ĉi disko. Sed esperantistoj punkemaj aŭ muzike scivolemaj, jen por vi finfine esperanta hardkora punkmuziko. Almenaŭ io nova, kio antaŭe Esperantuje ne ekzistis.

RH

Ĉu eblas punkmuziko esperante?

La kompildisko Esperanto subgrunde estas bonvena eldonajo por la viva subgrunda kaj liberecana parto de Esperantio. La brua kaj agresiva punkmuziko havas konekton al la ekstrema maldekstro, kaj estas cetere aŭskultata de multaj gejunuloj kiuj agas por bestaj rajtoj, naturprotektado kaj kontraŭ novnaziismo kaj senloĝejeco. Bedaŭrinde ĝis nun tiuj submovadoj ne multe videblis en la ĝenerala esperantomovado. En la pasinta jardeko punkmovado iĝis tre internacia, kaj la plej granda parto de la bandoj nuntempe kantas en la angla – sed multaj homoj kredas ke ekzakte ĉe punko estas granda bezono por neŭtrala internacia lingvo pro ideologismaj vidpunktoj. Pasintjare finna bando Manifesto Jukebox, unu el la plej bonaj, iĝis la unua finna bando kiu registris punkan kanton en Esperanto! Ĝis nun la kanto ne estas eldonita, sed oni atendas pri novaĵoj: espereble ĉi-jare aperos dua punka kompildisko, en kiu estus loko por Manifesto Jukebox, kaj eĉ por pliaj finnaj kontribuoj.

Teksto: P.Austin

Subgrundaj terminoj

La alternativmuzika terminaro estas vera ĝangalo, jen tamen kelkaj centraj vortoj:

Subgrunda (*underground*): ĝenerala termo por sub- aŭ kontraŭkulturo.

Hardkoro (*hardcore*) aŭ punkkoro: post la tiamŝoka **punkroko** (*punk rock*) de la 70-aj (ekz. *Sex Pistols*) punkmovado iĝis pli politika kaj muzike pli brua kaj rapida. Hardkoro estas ankoraŭ la centra stilo, sed ekz. je la disko *Esperanto subgrunde* oni aŭdas kelkajn pli *industrial*-muzikajn pecojn, t.e. komputiloj uzeblas por enmiksi modernan maŝinecan sonon.

Liberecano (*libertarian*): multaj ekstremaj maldekstremuloj uzas tiun vorton pri si nuntempe, anstataŭ la malnova kaj ofte misgvida termo ”anarkiisto”.

La bando EV ludis en Finnlando

12.12. internacia grupeto da esperantistoj vizitis la faman rokklubon Tavastia post la juleta festo de la Helsinka klubo. Okazis vespera koncerto de la renkontiĝo de MA-FUN, junulara organizo de ĉiuj finnugraj popoloj, en rokklubo Tavastia. Ni vidis folkgrupon Myllärit, el Petroskoi, kies dancigan muzikon oni ludis somere dum KEF, en la Nordia diskotekvespero. La koncerto estis pintkvalita kaj etoso bonega por marda vespero! Ne malbone ludis ankaŭ franca, precize bretonia folkpopbando EV, kiu kunportis al la estrado la faman kantiston Pauli Hanhiniemi (eks-Kolmas nainen). En 1995 EV prezentiĝis en la unua Vinilkosmo-kompildisko per sia esperantlingva kanto *Knabin'de Sarre*. La bando diras ke al ili tiu kanto estis projekto. EV – efektive kun Myllärit – estas pli-malpli la solaj nefinnaj bandoj en la mondo, kiuj koncertas finne! La miksaĵon de keltaj melodioj kaj finnlingvaj tekstoj klarigas la deveno de la kantisto Jari kiu havas finnan patrinon kaj sufiĉe bone sciopovas la finnan por verki tekstojn.

Raportis: P. Austin

Furora koncerto de Dolcxamar dum la IS

Dum la 44a Internacia Seminario de la Germana Esperanto-Junularo en Cŭhaven (2000-12-27 ĝis 2001-01-03), la novaj steloj sur la Esperanto-muzikĉielo brilis. Amase kaj freneze la publiko ekde la unua kanto dancis al la nekutima mikso inter malmola roko, repo kaj elektronika muziko. Por la plej granda parto de la ĉeestantoj estis la unua koncerto de la muzikistoj el Finnlando kies stilo tute freŝas kaj aktualas. Ilia KD “Lingvo Intermonda” baldaŭ ne plu haveblis ĉe la libroservo ĉar la stoko simple ne sufiĉis por la multnombraj aĉetemoj. La nepri-skribebla etoso kaj la elstara ekscito de multaj homoj dum la koncerto klare montris: Nova muzika epoko komenciĝis en junulara Esperantujo kiu sendube pretas por la veno de Dolcxamar.

DĴ Kunar (Gunnar Fischer)

**Esperantomusiikin ystäville on
levyjä myynnissä nyt netissä!
www.esperanto.fi/fejo/diskejo**

☰ Korespondi deziras

27-jara E-isto deziras korespondi pri ĉiuj temoj kun samideanoj en la tuta mondo. 398050 Rusio, Lipeck-050, P.O.Box 279, al sinjoro Timur Morgun.

Marilene M. Mendes, Estrada do Dendê, 1.250 Apt 204 Monero, C.E.P. 21.920-001 Ilha do Governador, Rio de Janeiro, Brazilo. Mi estas 50-aĝa lernantino de E-to.

Maria Lusía M. Villaca, Rua Dom Emmanuel Gomes, 1117 Apt 102 Jardim Guanabara, C.E.P. 21.940-350 Ilha do Governador, Rio de Janeiro, Brazilo. Mi estas instruistino de E-to.

Bulgara dentisto, 45-jara, volas korespondi kun gefinoj aŭ angle, france, hispane, portugale, germane, itale, ruse aŭ esperante. Konstantin Kacarov, Zahari Zograf N:o 28 str., Samokov-2000, Bulgario.

Lingvojara poŝtmarko

La 17an de januaro aperis poŝtmarko honore al la Eŭropa jaro de lingvoj. Ĝi konigas la temjaron, kiu estas deklarita de Konsilio de Eŭropo (41 membroŝtatoj + 6 pliaj en kultura kunlaboro) kaj la Eŭropa Unio. La celo estas pere de publikaj kampanjoj kaj aliaj aranĝoj konsciigi la ĝeneralan publikon pri la riĉeco de la lingva heredaĵo en Eŭropo kaj altigi la aprezon de multlingveco. La celo estas ankaŭ kuraĝigi pli da homoj lerni lingvojn, ankaŭ lingvojn malmulte lernatajn.

La lanĉo de la jaro okazos en Lund, Svedio 18-20 februaro. Tiam la temo lingvoj plej verŝajne multe videblos en la amasko-



munikiloj. Ankaŭ la Internacia tago de la patrina lingvo la 21an de februaro (deklarita de UNESKO en 1999) estos atentata en pluraj landoj. Retajn informojn troviĝas abunde: <<http://www.edu.fi/projektit/kielivuosi2001>>, <<http://groups.yahoo.com/group/Jaro-de-lingvoj-2001/links>>.

La poŝtmarko nature estas ĉarma rememorigo pri la graveco de komunikado sur letero de esperantisto. La eldonkvanto estas 1 000 000. Se vi volas unuatage ŝtampitan koverton (por via propra kolekto aŭ ekzemple por ekspozicio) vi povas mendi tian de Anna Ritamäki (adreso p. 2).

Nova eldono de "Pocket Esperanto Dictionary"

Pocket Esperanto Dictionary. English-Esperanto, Esperanto-English. Andrew McLinen. Rotterdam: UEA 2001. Dua eldono. ISBN 92 9017 072 7. 8+406p. 16cm. Prezo: EUR 15,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

En 1992 aperis ĉe la pola lingvoeldonejo Lingua Publications la unua eldono de "Pocket Esperanto Dictionary", dudirekta poŝvortaro de la angla kaj Esperanto de d-ro Andrew McLinen. Kun pli ol 50 000 vortoj kaj esprimoj kaj praktika formato ĝi tuj populariĝis kaj rapide elĉerpiĝis. Nova eldono tamen estis prokrastita kaj la libro ne estis aĉetebla dum pluraj jaroj, ĉar anstataŭ represi d-ro McLinen preferis plivastigi ĝin.

La dua eldono, kun 70 000 vortoj kaj esprimoj, ĵus aperis ĉe UEA. La originala eldonejo Lingua Publications plejparte zorgis pri la enkomputiligo sed pri la eldonado kaj distribuado ĝi proponis kontrakton al UEA. Laŭ la ideo de Lingua Publications la dua eldono ricevis ankaŭ novan formaton, tiun de la Jarlibro de UEA, kiu estas eĉ pli praktika kaj "poŝa" ol tiu de la unua eldono.

Gazetaraj komunikoj de UEA, n-ro 111

La unua lernolibro por udmurtoj

Udmurtoj estas autoktonaj loĝantoj de Udmurtio. Ekde la mezo de la 16a jarcento Udmurtio estas en Ruslando. El ĉ. 750 mil udmurtoj 496 mil loĝas en Udmurta Respubliko (ĉefurbo Iĵevsk). La udmurta lingvo apartenas al la perma branĉo de la finn-ugra lingvofamilio; ĝia skribsistemo estas cirilida.

La unuan lernolibron por udmurtoj verkis ruslingve konata E-instruisto Bronislav Ĉu-

pin; ĝin tradukis en la udmurtan lingvon ĵurnalisto kaj esperantisto Aleksandr Laptev. La lernolibron eldonis en decembro 2000 “Ruslanda Esperantisto” (Jekaterinburg, Ruslando), dank’ al subvencio de FAME-Fondaĵo (Germanio).

Ĉi tiu lernolibro estas aktualigita kaj perfektigita versio de la gazeta kurso de Bronislav Ĉupin, kiu aperis antaŭ kelkaj jaroj en junulara udmurta gazeto “Ĝoĉbur” (Saluton). La 80-paĝa libro enhavas 20 lecionojn.

La libro estas mendebla kontraŭ 4 euroj ĉe UEA, aliaj grandaj libroservoj aŭ rekte ĉe la eldonejo: Poŝte: RU-620014 Jekaterinburg-14, p.k. 162, Ruslando. Rete: <sezonoj@mail.ru>.

(Sezonoj)

Beletra mirlando – nun facile atingebla

Ĉu vi jam ofte sopiris bonan manlibron pri nia originala literaturo kaj aŭtoroj, inkluzive la plej nuntempaj? Ĉu vi volis kontroli detalon pri certa romano aŭ legi recenzon pri ĝi, sed ne sciis kie kaj kiel? Aŭ simple havi ioman superrigardon pri esperanta beletro?

Sveda verkisto Sten Johansson kreis retan pribeletran konsultejon, kiu troviĝas en <www.dreamwater.net/esperanto>.

Vi trovos ĉi adrese bonegan liston pri originale esperantaj romanoj, novelaroj, dramoj kaj aŭtobiografiajn informojn pri ties aŭtoroj. Pri pluraj verkoj tie legeblas ankaŭ recenzoj aŭ aliaj informoj.

Troviĝas en ĉi retejo ankaŭ ligoj al rete legeblaj revuoj kaj literaturo, al eldonejoj, libroservoj, zamenhofaj proverboj kaj multo pli.

Nepre vizitinda retejo por ĉiuj beletremuloj!

Elektronikaj libroj en Esperanto

Meze de januaro 2001 ekzistas pli ol 60 elektronikaj libroj en Esperanto. Listo kun ligiloj al ili troveblas en eLibrejo ĉe <<http://esperanto.nu/eLibrejo>>. La ciferoj paren-teze indikas la kvanton da paĝoj kaj la amplekson (MB) de la dosieroj. Pluraj el la eLibroj estas en komprimata formato kaj povas okupi pli da loko sur la durdisko.

Jen la haveblaj titoloj:

Junularaj kaj infanaj libroj

- L. Frank Baum: La eksterordinara lando Oz (322/5,4)
- L. Frank Baum: Ozma de Oz (272/3,9)
- L. Frank Baum: Doroteo kaj la sorĉisto en Oz (266/4,8)
- L. Frank Baum: La vojo al Oz (270/4,4)
- L. Frank Baum: La smeralda urbo de Oz (336/5,9)
- L. Frank Baum: La mikscifona knabino de Oz (346/12,9)
- L. Frank Baum: Tiktoko de Oz (304/6,8)
- L. Frank Baum: La birdotimigilo de Oz (320/5,1)
- L. Frank Baum: Rinkitinko en Oz (342/6,0)
- L. Frank Baum: La perdita princino de Oz (342/5,7)
- L. Frank Baum: La stana lignohakisto de Oz (320/4,9)
- L. Frank Baum: La magio de Oz (294/4,8)
- L. Frank Baum: Glinda de Oz (310/3,2)
- L. Carroll: La Aventuroj de Alico sub la Tero (90/3,0)
- L.C.: La Aventuroj de Alico en Mirlando (192/1,5)
- Lewis Carroll: Trans la Spiegulo: kaj kion Alico trovis tie (244/2,0)
- Georg Fröschel: Ho ve, miaj ŝuoj! (32/0,5)
- Åke Holmberg: Ture Sventon en Londono (80/0,2)
- Astrid Lindgren: Pipi Ŝtrumpolonga (184/0,5)
- Astrid Lindgren: Ronjo, rabista filino (parto, 69/0,2)
- Antoine de Saint-Exupéry: La eta princo (84/5,7)

Beletro: prozo

- Eposoj el antikva Ugarito (73/0,5)
- Frans G. Bengtsson: Orm la Ruĝa (262/0,65)
- Miguel de Cervantes: Don Kiĥoto de la Manĉo en Barcelono (39/1,3)
- K. G. Chesterton: La naiveco de pastro Brown (248/0,5)
- Charles Dickens: Kristnaska kanto (71/0,2)
- Jerome K. Jerome: Tri viroj en boato (218/0,75)
- Sten Johansson: Denaska kongresano (50/0,2)
- Selma Lagerlöf: La infanoj de Betlehem (23/0,1)
- Selma Lagerlöf: La junulino el Stormyr (62/0,2)
- Selma Lagerlöf: La mono de sinjoro Arne (85/0,4)

Selma Lagerlöf: La ringo de la generalo (96/0,25)
Pär Lagerkvist: Mariamne (61/0,2)
Artur Lundkvist: La volo de l'ĉielo (222/0,4)
Heinrich A. Luyken: Pro Iŝtar (275/0,6)
Eliza Orzeszko: Bona sinjorino (43/0,15)
Boleslav Prus: La faraono, I (260/0,6)
Aleksandr Puŝkin: La neĝa blovado (15/0,1)
August Strindberg: La insulo de feliĉuloj (65/0,2)
August Strindberg: La konscienco riproĉas (47/0,15)
Hjalmar Söderberg: La kiso (64/0,2)
Mary Webb: Malbeno kara ("dialekta" eldono) (251/0,9)
Mary Webb: Veneno kara (norma esperanto) (259/0,9)
P. G. Wodehouse: La princo kaj Betty (142/0,3)

Beletro: poezio

Magda Carlsson: Sveda poemaro (113/0,3)
Raymond Schwartz: La stranga butikoj (129/0,3)
Ferenc Szilágyi: Tra mia prismo (82/0,2)

Beletro: teatro

Arthur Azevedo: Amo per proverboj (16/0,4)
Nikolao Hohlov: La morto de la delegito de UEA (15/0,2)
August Strindberg: Pario, unuakta teatraĵo (23/0,1)
August Strindberg: Pasko, dramo en tri aktoj (75/0,17)

Religio

Biblio: Malnova testamento, parto 1 (453/1)
Biblio: Malnova testamento, parto 2 (421/1)
Biblio: Malnova testamento, parto 3 (447/0,7)
Biblio: Malnova testamento, parto 4 (438/1)
Biblio: Nova testamento (494/1,3)

Noto: La Biblio estas havebla ankaŭ en apartaj, pli malgrandaj dosieroj, ekzemple la Nova testamento laŭ la unuopaj evangelioj.

Ceteraj libroj

Charles Baudouin: La arto de memdisciplino: Psikagogio (49/0,1)
Louis Beaucaire: Kruko kaj Baniko en Bervalo (173/0,3)
Marjorie Boulton: Ne nur leteroj de plum-amikoj (68/0,2)
E. Drezen: Zamenhof (47/0,2)
Ralph Harry: La diplomato kiu ridis (79/0,45)
Valdemar Langlet: Vojaĝimpresoj (43/3,9)
James Vasco Milanez: La ĉela telefonsistemo (15/0,2)
Platono: Kratilo (60/0,3)
Platono: La respubliko (309/0,9)
János Sárközi: Optiko (122/1,3)
L. L. Zamenhof: Esenco kaj estonteco de la lingvo internacia (55/0,17)

La eLibroj estas formatitaj, t.e. tipografie prilaboritaj laŭ paĝoj. La esperantaj literoj estas ĉiam korekte montrataj. Oni povas legi ilin per la senkostaj programoj eBook Reader aŭ Acrobat Reader. La unua ebligas, ke oni markas la tekston de la legata libro kaj aldonas personajn notojn al ĝi.

La libroj en ĉi tiu listo estas senpage elŝuteblaj.

Franko Luin (franko@esperanto.se)

Fonto: Interredaktore

La esperantisto de la jaro 2000

Surpriza rezulto

“La Ondo de Esperanto” iniciatis en 1998 proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Tiu projekto trovis vastan subtenon, kaj al ĝi aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj. La unua laŭreato en 1998 estis skota poeto William Auld; en 1999 lin sekvis aŭstralia juristo Kep Enderby, prezidento de UEA kaj de Esperanta Jura Asocio.

En 2000 fare de 9 kandidatigantoj estis proponitaj 20 personoj, el kiuj 9 elektantoj povis elekti po 1 ĝis 3 personojn. La 15an de decembro 2000, je la Zamenhofa Tago, estis anoncita la rezulto de la voĉdonado:

3 voĉoj: Hans Bakker, Mauro La Torre, Jouko Lindstedt

2 voĉoj: Renato Corsetti, Ilona Koutny, Floreal Martorell

1 voĉo: Reinhard Foessmeier, Jerzy Fornal, Stano Marček, Tibor Papp, Andrzej Petryn, Claude Piron, Katalin Smideliusz.

Konforme al la Regularo, Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt estas proklamitaj kiel Esperantistoj de la jaro 2000!

Hans BAKKER (Nederlando) meritis la rekonon pro la sukcesoj en la agado por Esperanto en Afriko.

Mauro LA TORRE (Italio) iĝis laŭreato pro la projekto “Interkulturo”, kies kvazaŭlernejo “Tibor Sekelj” jam ampleksas preskaŭ 100 klasojn el trideko da landoj kun ĉirkaŭ du mil lernantoj.

Jouko LINDSTEDT (Finnlando) estas distingita pro la prizorgo de BJA-listo, okazigo de seminario dediĉita al la 20-jariĝo de la Manifesto de Rauma kaj pro la “Hejma vortaro”, redaktita de li, kiu estis disvendita naŭ monatojn post la eldono kaj represita post la Tel-Aviva UK.

Proponantoj (Kandidatigantoj)

Marija Beloŝeviĉ (ekssekretario de ILEI)
Viŝnja Brankoviĉ (posedanto de “Orbis Pictus”)

Renato Corsetti (vicprezidanto de UEA)
Istvan Ertl (redaktoro de “Esperanto”)
Edmund Grimley Evans (prezidanto de EAB)

Judit Felszeghy (direktoro de LF-koop)
Aleksander Korĵenkov (redaktoro de “La Ondo de Esperanto”)

Bruno Masala (gvidanto de AERA ĉe OSIEK)

Valentin Melnikov (poeto, ĵurnalisto, tradukanto)

Elektantoj

Petr Chrdle (estrarano de UEA, posedanto de KAVA-PECH)

Lee Chong-Yeong (eksprezidanto de UEA, prezidanto de KEA)

Geraldo Mattos (prezidanto de la Akademio de Esperanto)

Stefan Maul (prezidanto de TEĴA, ĉefredaktoro de “Monato”)

Mine Yositaka (redaktoro de “Riveroj”)
Sergio Pokrovskij (sciencisto, tradukanto, eseisto)

Anna Margareta Ritamäki (aktivulo pri eksteraj rilatoj)

Roland Rotsaert (kasisto de IKEF, redaktoro de “La Merkato”)

Ljubomir Trifonĉovski (ĉefredaktoro de “Literatura Foiro”)

(Sekretario Halina Gorecka)

Fonto: Sezonoj

Kandidatoj por premio “La verko de la jaro” 1999

Estas ses la libroj kandidataj por Premio “La Verko de la Jaro” 1999, kiun la abonantaro de “Literatura Foiro” aljuĝos inter la beletraj prozaĵoj originale verkita en E-o kaj surmerkatigitaj en 1999-2000 (ĝis oktobro).

1. “La malbabela jaro” de Vinko Oshljak (Jadwiga, 1999).
2. “La ŝtona urbo” de Anna Loewenstein (FEL, 1999).
3. “Mokrokalvo, la gigantegegego” de Gunnar Gaellmo (Al-fab-et-o, 1999).
4. “Neniu ajn papilio” de Trevor Steele (IEM, 2000).
5. “Serĉu, kaj vi trovos!” de István Nemere (Al-fab-et-o, 1999).
6. “Trans maro kaj morto” de Sten Johansson (Al-fab-et-o, 1999).

Por eniri la liston, ĉiu libro devis esti proponita de almenaŭ tri membroj de Esperanta PEN-Centro.

La balotilo aperos en la februara numero de “Literatura Foiro”. *(Alga Guernieri, sekretario)*

Fonto: Heroldo komunikas 092

Tutmonda fabelkonkurso al infanoj 2001

La Instituto de Päätalo en la komunumo de Taivalkoski estas verkista edukcentro en Norda Finnlando. La Instituto aranĝis fabelkonkurson al finnaj infanoj ĉiujare jam ek de la 1994-a jaro.

Metsäkylä estas unu vilaĝo en la komunumo de Taivalkoski.

La Instituto de Päätalo kaj la Vilaĝasocio de Metsäkylä aranĝis en la jaro 2000 la unuan tutmondan esperantlingvan fabelkonkurson al ĉiuj infanoj kiuj jam scipovas aŭ nur studas Esperanton. La konkurso bone sukcesis kaj nun okazas Fabelkonkurso 2001.

La kategorioj en la konkurso estas: **A:** ĝis 9-jaraj **B:** 10-11 jaraj **C:** 12-14 jaraj. La konkursfabelo estu 50-150 vortoj en kategorio A, 100-500 vortoj en kategorio B kaj 200-1000 vortoj en kategorio C. La ĵurio aprezas la fabelecon kaj originalecon de la verkaĵo. En la skribado aŭ tajpado plenkreskulo rajtas helpi laŭ sia konscienco.

La celo de la konkurso estas, ke geknaboj interesiĝu pri la uzado de lernita lingvo, ke ili daŭrigu sian bonan hobion kaj ekzercu sian kreivecon.

La rezulton de la fabelkonkurso oni publikigos kaj anoncos fabeltage (18. oktobro), samtempe kun la rezultoj de la finnlingva fabelkonkurso, dum infansemajno, kiun oni aranĝas en Taivalkoski en oktobro 2001-a.

La limdato estas la 31-a de julio 2001-a. Bonvolu, sendi viajn fabelojn por la konkurso al la jena adreso: La Instituto de Päätalo, PL 39, FI-93401 Taivalkoski, Finnlando.

Bonvolu skribi sur la koverto la vorton "Fabelkonkurso". Bonvolu uzi pseŭdonimon kaj aldoni kuverton kun via nomo, adreso, naskiĝdato kaj telefonnumero.

Retadreso: <instituutti@taivalkoski.fi>, <www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti>.

Pli da informoj: Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala. Rete: <aini.vaaraniemi@pp.inet.fi>.

Esperanton alkeis- ja jatkokurssi 1.–5.7.2001

Valamon Kansanopistossa Heinävedellä (lauantai–torstai)

Alkeiskurssilla on suomalainen opettaja, Sylvia Hämäläinen. Jatkokurssilla on opettajana Atilio Orellana Rojas (Argentiina/Hollanti). Kurssit järjestetään yhteistyössä Suomen Esperantoliitto ry:n kanssa.

Viiden päivän kurssin hinta on majoituksesta riipuen 1450 mk (1hh) ja 1250 mk (2hh) tai 1150 mk (1hh) ja 1050 mk (2hh).

Osoitteet: Valamon kansanopisto, 79850 Uusi-Valamo. Puh. (017) 5701 400, fax (017) 5701 402. Sähköposti: <valamon.kansanopisto@valamo.fi>.

☰ Korespondi deziras

Alloga ukraina fraŭlino (33j.), faka tradukistino en UN, deziras konatiĝi kun samaĝa viro.

Helena Payuk, Oficejo de UN, 1 Klovskij uzviz, Kyiv, UA-01021, Ukrainio. Rete: <LNP@un.kiev.ua>

Stojakova Tatjana, instruisto de la franca lingvo serĉas amikon pli ol 30 jaraĝan. Pr. Solidarnosti 7-1-6, St-Peterburg, RUS-193312.

Izotova Ksenija kaj Metshalova Olja, 12-jaraĝaj simpatiaj knabinoj, korespondos kun knaboj 13-15 jaraĝaj (en franca, angla kaj Esperanto). Pr. Solidarnosti 9-1-300, St-Peterburg, RUS-193312.

Suomen esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon Ilkka Santtilalle, Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset toimivat:

- ♦ Helsingissä: Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☒ Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- ♦ Iisalmessa: Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispohantie 298, 74100 Iisalmi
- ♦ Jyväskylässä: Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, (Terttu Tyynelä) PL 136, 40101 Jyväskylä
- ♦ Lahdessa: Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ☒ martti.pennanen@pp.phnet.fi
- ♦ Mikkelissä: Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkelä, (Elli Husso) Porrassalminkatu 27 B 51, 50100 Mikkelä.
- ♦ Oulussa: Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ♦ Salossa: Salon Esperantokerho / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☒ matti.wallius@pp.inet.fi

- ♦ Tampereella: Esperantoseura Antaūen ry. / Esperantosocieto Antaūen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Rainer Arvola, Kärjätormentä 2 E 32, 33310 Tampere, ☒ andromeda@koti.tpo.fi)
- ♦ Turussa: Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☒ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Lappeenrannassa esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan "esperantoryhmä", jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu

- ♦ Suomen opettajain esperantoliitto, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☒ raitapy@jymy.kase.fi ☎ (06) 8637 351 Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☒ fejo@esperanto.fi
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☒ Ritva.Sabelli@sfs.fi ☎ (09) 660 651

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

Salutojn al Esperantolehti

Estimataj gesamideanoj! Loĝantaro de urbo Niĝnevartovsk (Rusio, Siberio) varme gratulas vin okaze de Novjaro, Nova jarcento! Ni Bondeziras al vi Bonan Sanon, feliĉon, prosperon. Vivu paco, amikeco, libero! Estraro de historia societo en u. Niĝnevartovsk.

Prezidanto T. Ŝuvajev

Rusio 628606, "Niĝnevartovsk-6", str 60 let Oktjabria 6-135, Interklubo "E-to".

Estimata redaktantaro de Esperantolehti, mi uzas ĉi tiun ret-adreson, kiun mi trovis en la lasta numero de via ĉiam pli bela revuo. Dankon pro via regula sendado de ĝi. Mi ĉiam legas la legeblajn partojn kaj rigardas la suom-lingvajn.

Multajn bondezirojn okaze de la nova jaro al vi kaj al la estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando.

*Amike, Renato Corsetti
UEA, landa agado*

SANAT: On ihanaa kun sanotuksi saa

Suomen Esperantoliiton talvipäivät

Euroopan kielten teemavuonna 2001

Hämeenlinnassa 17.-18.3. Hotelli Emilia, Raatihuoneenkatu 23

Suomen Esperantoliiton talvipäivien teema tänä vuonna on sanat. Sanat ovat kielen olennaisia elementtejä. Me tarvitsemme niitä, mutta kuinka usein me omistamme kokonaisen viikonlopun sanoille?! Nyt meillä on tilaisuus käyttää kaksi sanarikasta päivää Hämeenlinnassa kielitieteilijöiden, sanakirjan tekijöiden, akateemikkojen, kulttuurin ja esperanton ystävien seurassa, jotka kaikki – samoin kuin sinä ja minä – pitävät sanoista. Me opiskelemme, leikimme ja nautimme juuri sen oikean sanan löytämisen ilosta. Voit huoletta käyttää omaa luovuuttasi tai vain seurata muiden luovaa toimintaa. On ihanaa kun sanotuksi saa!

Ohjelmassa avustavat mm. Jorge Camacho, Jouko Lindstedt, Riitta Hämäläinen, Anja Karkiainen, Jukka Laaksonen, Jukka Vaijärvi ja Anna Ritämäki. Alla oleva ohjelma on alustava.

(Jos haluat tarkempia tietoja, ole hyvä ja ota yhteyttä Anna Ritämäkeen, yhteystiedot sivulla 2.)

Ohjelma

Lauantai 17.3.

- 10 Päivien vastaanottopiste avataan
- 11 Suomenkielinen yleisöluento:
Esperanton kielen rakenteesta ja Euroopan kielten teemavuoden ohjelmasta Suomessa (Anna Ritämäki ym.)
- 12 Lounas
- 13 Päivien avaus ja teeman esittely
Sanastotyö – Esperantoakatemiassa ja Suomessa

Uusi suomi-esperanto sanakirja on työn alla: käytännön kokemuksia sanakirjatyöstä (Camacho, Lindstedt, Riitta Hämäläinen)

15 Kahvitauko

15.30 Käännetään yhdessä erilaisia tekstejä – yleistekstiä, sarjakuvaa, runoa – ja tutkitaan tuloksia

17-19 Kokoustiloja varattu mahdollisia kokouksia varten

18 Hämeenlinnan Esperantorastit.

Viihteellinen paikallisten esperantistien suunnittelema kaupunkisuunnistus Hämeenlinnan keskustassa. Hyvät palkinnot!

19 Iltaruoka hotellin ravintolassa etukäteen tilanneille

19-22 Sanaleikki-ilta

Ohjelmassa mm. Jukka Vaijärven kehittämä Sufiksoludo, Sten Johanssonin Glosoblogo -kielipeli, Sananselityskisa. Suunnistuksen palkintojen jako.

Sunnuntai 18.3.

9 Aamuhartaus

9.30 Vuosikokousvaltakirjojen tarkastus

10 Suomen Esperantoliiton vuosikokous

12 Lounas

13 Perinteiset ja uudissanat – voiko sanoilla ilmaista kaiken?

14 Sanaraati kokoontuu yleisön edessä sekä pohtii ja antaa suosituksia esperantokäännöksiksi vaikeasti käännettäviin suomen kielen sanoihin

15.30 Talvipäivien päätös ja lähtökahvit

VORTOJ: Mirindas kiam vorte direblas

Vintraj Tagoj de EAF dum la Eŭropa jaro de lingvoj 2001

17-18 de marto en Hämeenlinna

Hotelo Emilia, Raatihuoneenkatu 23

La Vintraj Tagoj de EAF ĉi-jare temas pri vortoj. Vortoj estas esencaj elementoj en lingvo. Ni bezonas ilin. Ni uzas ilin, sed kiom ofte ni dediĉas tutan semajnfino al atento pri ili?! Nun vi havas la ŝancon pasigi du vortoplenajn tagojn en Hämeenlinna kune kun lingvistoj, vortaristoj, akademianoj, klubanoj, kulturamantoj, komencantoj... esperantistoj kiuj ankaŭ, same kiel vi, ŝatas vortojn! Ni lernos, ludos kaj ĝuos la trovadon de la ĝusta vorto por esprimi ion. Vi ankaŭ povos uzi viajn proprajn kreajn talentojn aŭ simple sekvi la krea laboron de aliaj. Mirindas kiam vorte direblas.

Al la programo kontribuos i.a. Jorge Camacho, Jouko Lindstedt, Riitta Hämäläinen, Anja Karkiainen, Jukka Laaksonen, Jukka Vaijärvi kaj Anna Ritamäki. La suba programo estas provizora. (Se vi deziras pli ekzaktajn informojn bv. kontakti Anna Ritamäki, kontaktinformoj en p. 2.)

Ni kore bonvenigas vin al Hämeenlinna uzi vortojn kaj la lingvon Esperanto!

Programo

Sabato 17.3.

- 10 Akceptejo ekfunkcias
- 11 Publika prelego (en la finna lingvo) pri la Europa jaro de lingvoj kaj Esperanto (Ritamäki k.a.)
- 12 Lunĉo
- 13 Malfermo de Vintraj Tagoj, prezentado de la temo
 - Vortara laboro – en la Akademio kaj en Finnlando

- Nova finna-esperanto vortaro; spertoj pri la praktika laboro (Camacho, Lindstedt, Hämäläinen)
- 15 Kafopaŭzo
- 15.30 Lernu pri tradukado!
 - Enkonduko de Jorge Camacho.
 - Tradukado en grupoj (novaĵtekstoj, komiksoj, poemoj)
- 17-19 Kunvenejoj rezervitaj por eblaj kunvenoj
- 18 Urba orientado en la mezo de Hämeenlinna aranĝita de lokaj esperantistoj. Bonaj premioj!
- 19 Vespermanĝo por tiuj, kiuj antaŭmendis ĝin
- 19-22 Vortluda vespero en Esperanto i.a. Sufiksoludo de Jukka Vaijärvi, Glosoblogo-ludo de Sten Johansson kaj Priskribo-ludo. Disdono de premioj pri urba orientado.

Dimanĉo 18.3.

- 9 Matenpreĝo
- 9.30 Kontrolo de jarkunvenaj rajtigiloj
- 10 Jarkunveno de Esperanto Asocio de Finnlando
- 12 Lunĉo
- 13 Enkonduko: Tradiciaj vortoj kaj neologismoj – ĉu eblas esprimi ĉion?
- 14 La vortkonsilio kunsidas antaŭ la publiko – cerbumoj kaj rekomendoj pri esperantaj esprimoj por malfacile tradukeblaj finnlingvaj vortoj
- 15.30 Fermo de Vintraj Tagoj kaj adiaŭa kafo

Helsingin esperantoseura

Joka tiistai: Toimisto avoinna klo 17-19, osoite Siltasaarenkatu 15 C 65.

28.-30.09. Esperantoliiton syyspäivät Kulttuurikeskus Caisassa Helsingissä.

Esperantoseura Antaŭen

Agadprogramo 2001

Klubvesperoj okazos en la klubejo NESTO Satakunnankatu 30 C 6. La vesperoj okazas lunde kaj komenciĝas je la 17a.

La enirejaj pordoj fermiĝas aŭtomate precize je la 17a tial bonvolu veni iomete pli frue. En klubvesperoj ni servas kafon aŭ teon, kostas minimume 5 FIM.

Vintro

5.2. FEBRUARA studvespero.

19.2. JARKUNVENO. Ni kontrolas, kion ni faris dum la pasinta jaro. Ĉiuj membroj estas invititaj kontroli.

19.3. MARTA vespero. Ni konatiĝos kun Zagrebo, venonta kongresurbo.

23.4. APRILA vespero. Libro prezentado. Sylvia Hämäläinen kaj Lauri Liukkonen elektas la librojn kaj prezentos ilin.

MAJO, ekskurso.

MEMBROJ sekvu "Memorliston" de Aamulehti dimanĉe, ni anoncas se ni ricevas surprizvizitantojn aŭ niaj planoj ŝanĝiĝos.

Jyväskylä Esperantokerho

Syyskokouksessa 15.11. valittiin kerhon toimihenkilöt vuodelle 2001. Puheenjohtaja on Terttu Tyynelä, sihteeri Kari Kettunen, varapuheenjohtaja Pentti Makkonen ja rahastonhoitaja Seija Kettunen. Muut hallituksen jäsenet ovat Risto Jämsen, Aune Makkonen, Aimo Nikander, Norma Perälä ja Heikki Veijanen. Tilintarkastajat ovat Tauno Saarikangas ja Sinikka Varpula, varatilintarkas-

taja Erkki Manninen.

Kokoonnumme edelleen Sepänkeskuksen huoneessa Protoni, keskiviikkoisin klo 16.30. Lähiaikojen ohjelma on seuraava:

21.2. Esperanto ystävyyden kielenä.

7.3. Kevätkokous.

21.3. Talvipäivien kuulumisia, muistojen albumin selailua.

4.4. Aivovoimistelua suomeksi ja esperantoksi.

18.4. Baltaj Esperanto-tagoj.

2.5. La eta Princo -opintopiirin kooste.

Esperanto-Klubo de Lahti

Estraro por la jaro 2001:

Esa Lång, prez. (03) 735 2723, Lokink. 5, 15610 Lahti. Martti Pennanen, sekr. (03) 733 3288, Kalliomaank. 10, 15150 Lahti. Soile Salminen, kas. (03) 781 7637, Kivikatu 8 C 51, 15700 Lahti. Matti Soikkeli, Hilikka Galle, Eero Rinta-Karjanmaa.

Kluba adreso estas tiu de M. Pennanen.



Patrik kaj Pipsa, la novaj FEJO-estroj.



FEJO-semajnfino kaj -jarkunveno en Porvoo 12.-14.1.2001

La 13-an de januaro okazis jarkunveno de FEJO en Porvoo. En la jarkunveno la estraro preskaŭ komplete ŝanĝiĝis. La nova, juna kaj entuziasma estraro de FEJO havas nun la sekvan konsiston:

Patrik Austin, Porvoo/Helsinki (prezidanto)

Pipsa Ahonen, Helsinki (vicprezidanto)

Katja Lampinen, Helsinki (sekretario)

Timo Pirinen, Porvoo (estrarano)

Mikko Erkinaro, Jyväskylä (estrarano)

La eksterestrara kasisto de FEJO estas *Eeva Vaijärvi*.

La unua FEJO-semajnfino post longa malviglo estis tre sukcesa kaj ĝin partoprenis entute preskaŭ dudeko da FEJO-veteranoj kaj novuloj. Ne hazarde la FEJO-semajnfino okazis ĝuste en Porvoo. Porvoo momente estas klare la plej esperantojunulara urbo en Finnlando. Vivas kaj aktivas tie ne nur Dolcxamaranoj, sed ankaŭ junulara esperanta studrondo konsistanta el 4 personoj.

Unika sperto por ni malmuzikistoj estis viziti trejnejon de rokbando kaj tie ĝui splendan koncerton de Dolcxamar, tre intimetosan. Duono de partoprenintoj estis niagrupanoj, la alia duono junaj, malesperantistaj porvoo-anoj, kiuj venis por aŭdi esperantan rokon kaj repon.

Dum la FEJO-semajnfino Patrik gvidis nin tra porvoo-aj vidindaĵoj. Ni konatiĝis

kun tomboj de J.L. Runeberg, Eugen Schau-
man ks., kun la fama pino, pitoreske ligna
Porvoo, domo de Remu Aaltonen kaj pasigis
vesperon en lokaj trinkejoj kaj diskejo Gi-
guli.

Krome ni poluris nian recenzteknikon
(Kun ei... niin ei...), kultivis june idealism-
ajn ideojn, lernis ŝmiri buterpanojn sub gu-
rua gvido de Patrik kaj la sufiksludo de Juk-
ka kondukis nin al la rando de "ridomort-
rivero", poezio kaj frenezo.

Kaj ni bone amuziĝis.

Raportis RH

Oletko jo FEJO:n jäsen?

FEJO:n jäsenmaksu:

- alle 30-vuotiaille 50 mk
- tukijäsenille 70mk.

Uusi tilinumero on 101130-
227446 (Merita)

FEJO:n jäsenenä saat alennusta järjes-
tämiemme tapahtumien hinnoista ja
pysyt menossa mukana. Lisäksi varsi-
naiset jäsenet saavat Esperantolehden.
FEJOn vilkastunutta toimintaa kannat-
taa nyt tukea!

FEJO-membrokotizoj 2001:

- 50mk/membro
- 70mk/subtenanta membro

Kontonumero supre.

La nova FEJO-reĝo portrete

– Patrik Austin – oste intelekta rokrevulo –

Riitta: Patrik Austin, la 13-a de januaro estis grava tago en la mondhistorio: Oni elektis vin la nova prezidanto de FEJO. Gratulon!

Patrik: Dankon.

R: Unue, rakontu al ni, kial vi nomiĝas Austin? Simile al la teksasa ĉefurbo?

P: Jes, fakte, la nomo devenas de Usono. Mia praavo laboris en la Usona Ŝiparo kaj ŝajne angligis sian familian nomon.

R: Kaj la klasika demando: Kiam vi lernis Esperanton? Kaj kial?

P: Antaŭ 2,5 jaroj. Mi tiam studis en Londono kaj volis lerni tri lingvojn, la francan, la germanan kaj Esperanton. Esperanton mi lernis.

R: Priskribu vin per kvar adjektivoj.

P: Ho ve...cerbumema...(meditas longete)...osta...intelektula...(meditas eĉ pli longe) kaj rokema. Sed hej, forigu "intelektula"! Ne, mi devas nun diri ion tute alian.

R: Vi jam estas en la helsinka estraro, vi estas la ulo malantaŭ la plej priparolata esperanta bando, Dolĉamar, vi aldone havas alian bandon finnlingvan kaj nun vi estas la nova estro de FEJO. Kiel vi sukcesas? Ĉu vi estas ekstreme ambicia, plenfreneza, superviro, bonege organizita aŭ kio estas via problemoj?

P: Estas la tradicia rakonto pri viro, kiu ne scipovas diri "Ne"...

R: Kion vi krome faras en la vivo?

P: Mi studas en la Helsinka Universitato. Nordiajn lingvojn kaj filozofion.

R: Kio vi iĝos?

P: Mi jam iĝis mi mem.

R: Kiel la nova FEJO-estro vi certe havas iajn viziojn pri la estonto de FEJO? Kiajn?

P: Por mi kompreneble plej gravas la junulara kulturo. Ĉar eĉ se kliŝo, en la junularo estas la estonto. Kaj junularkulturo, t.e. popularmuziko, komiksoj ktp., estas la afero kiu povas fari Esperanton interesa por gejunuloj. Mi pensas, ke FEJO estas reviviginda organizo. Kaj mi promesas, ke estonte ĉiujare okazos du junularaj eventoj en Finnlando. Gravus kompreneble, ke troviĝos ankaŭ aliaj aktivuloj en Finnlando kaj gravas la kvalito. Sen tio ne funkcias. Mi mem cetero eĉe interesiĝas pri roko, sekso kaj biero.

R: Aha. Kaj kiel vi intencas enkonduki viajn interesojn en FEJOn?

P: Koncertoj kaj biervesperoj jam okazis kaj okazas. Kaj dum preskaŭ ĉiuj FEJOanoj estas junaj virinoj...

R: Sukceson por via politiko! Sed vi estas relative nova espisto. Rakontu, kiajn tujajn impresojn vi havis/-as pri nia movado.

P: Estas multaj bonaj aferoj. Kaj mi jam rimarkis, ke surprizaj aventuroj vere eblas en Esperantujo. Sed mi rimarkis ankaŭ, ke grandparte mankas vera junulara kulturo kaj mi esperas, ke tio estonte ŝanĝiĝos. Ne signifas, ke ĉiuj junuloj ŝatus nur festi. Sed unue venas roko, poste aliaj aferoj komencas vekti intereson, ekz. literaturo.

R: Via vizaĝo grande aperas en la nova broŝuro de EAF kun la titolteksto "Rakastu esperantoksi". Kion vi opinias pri tio? Ĉu vi estas la oficiala sekssimbolo de finnaj esperantistoj, ĉu vi ne sentas vin misuzata?

P: Enorde, mi ŝatus esti misuzata kiel sekssimbolo!

R: Krom tio, kian vivfilozofion vi havas?

P: Daŭre roku! Krome, al mi grava afero estas la pluraleco de kulturo. Tio, ke ĉiu povas trovi sian propran lokon en la mondo. Ne prenu ĉion pretan, trovu kaj provu mem.

R: Kiel oni venas al tia filozofio? Kia infano vi estis?

P: Revulo kaj pensemulo. Sed ankaŭ mi ludis futbalon kiel ĉiuj knaboj. Sed jam infanaĝe mi multe pensis pri vivo kaj filozofiaj demandoj.

R: Ĉu vi estas feliĉa?

P: Fakte, jes, nuntempe. Oni devas apreci kion oni havas kaj ĝui la splendajn aferojn kiujn oni atingis.

R: Kaj laste, Pieĉjo, rakontu al ni, ĉu vi havas umikinon aŭ ĉu ĉi rokema, osta, intelekta revulo estas libere kaptebla?

P: Hmm...nu jes...kion diri. Mi ja havas umikinon. Sed ĉu eble mi devus diri "Ne" pro imagbildaj kialoj...



FEJO maalla, merellä ja vankilassa

FEJO:n toiminta on vilkastumassa. Marraskuun lopulla käytiin Helsingissä hikinen sählyottelu Porvoo–Helsinki, jonka jälkipyykki pestiin notkuvien herkkupöytien ääressä. Parhaaseen pikkujouluaikaan 7.-10.12.2000 FEJO valloitti Itämeren ja pienen palan Tukholmaa.

Sählymestaruus Porvoolle

Keväisestä jalkapallotappiostaan toivuttuaan Helsinki haastoi Porvoon uusintataisteluun. Tällä kertaa aseiksi valittiin sählymailat ja paikaksi Merihaan palloiluhalli.

Helsingin urheaa valmentautumista kuitenkin varjosti joukkueen tähtipelaajan yllättävä loukkaantuminen. Näin ollen isäntäkaupunki ja Turku päättivät yhdistää voimansa taistellakseen vuoden sählääjien titelistä.

Sählyottelun määräpäivänä paikalle ilmestyi seitsemän fejolaista joista neljä vannoi Liittoutuneiden ja kolme Porvoon nimeen. Heidän ilokseen paikalle saapui myös kaksi uskollista kannattajaa joista toinen toimi myös lehdistön edustajana.

Kamera ikuisti filmille odotettua kiihkeämmän matsin. Maaleja tehtailtiin puolin ja toisin tiiviiseen tahtiin, kunnes kolmen hikiisen erän jälkeen Liittoutuneille myönnettiin ansaittu hopea ja Porvoon tehokolmikko julistettiin vuoden 2000 sählykuninkaaksi.

Illan parhaaksi suoritukseksi nimettäköön kuitenkin maukas ruoka á la Vaijärvi joka maistui nälkäisille urheilijoille. Syömisen lomassa fejolaiset katsastivat kauhuleffa Incubuksen joka osoittautui maineensa veroiseksi.

Yöunensa menettäneet joukkueet päättivät huolehtia intensiivisestä matsista seuraavaa nestehukkaa kuten aitojen atleettien kuuluu. Kyseistä nestevajausta huoltaessa baarikierros venähtikin hyvin varhaiseen aamuun asti.

Nähtäväksi jää miten käy nyt jo perinteeksi muodostuneessa sählyottelussa tänä vuonna. Ainakin on selvää että Porvoolla mestaruuden puolustaminen on suuremman työn alla Helsingin turnauskestävyyden tuplaantuessa. Vai löytyyköhän jostain päin Suomea esperantisteja joilla riittää rohkeutta haastaa molemmat tiimit...?

Teksti: Pipsa Ahonen

Ranetojen vieraksi

Joulukuiselle Ruotsin matkalle lähti yhdeksän fejolaista. Suurin osa matkalaisista oli vanhoja konkareita, mutta joukossa oli myös muutamia uusia kasvoja. Matkanjohtajamme Riitta Hämäläinen ohjasi sekalaista seurakuntaamme varmoin ottein.

– Alunperin yksityisenä tarkoituksenani oli vain lähteä pistäytymään Tukholmassa moikkaamassa hyviä kavereitani. Tulimpa



Dekadenco de junularo? Male, FEJO reviglas. Viglaj (?) FEJO-anoj Sarêjo, Pipsa kaj Maikki en stokholma drinkejo.

kysäisseeksi, lähtekö kukaan muu mukaan. Halukkaita oli heti ja päätimme hieman laajentaa asiaa, kertoo Riitta.

Tukholmassa hyvinvoinnistamme huolehtivat Bertilo Wennergren, Per Aarne Fritzson ja muut Tukholman Ranetoj-seuran jäsenet.

Yö vankilassa

Ranetojn väki oli järjestänyt meille ohjelmaa yllin kyllin. Perjantapäivä kului pakolisen kaupunkikierroksen merkeissä. Perjantai-iltana kokoonnuimme Ranetoj-väen kanssa intialaiseen ravintolaan. Sieltä suurin osa joukosta jatkoi matkaansa paikallisiin baareihin. Syviä filosofisia ja kielitieteellisiä keskusteluja käytiin niin suomeksi, esperantoksi kuin ruotsiksikin.

Yön vietimme sitten vankilassa. Maja paikaksi kurittomille suomalaisille oli järjestetty entinen vankila, Långholmen. Nykyisin matkustajakotina ja hotellina toimiva rangaistuslaitos on edelleen sisustettu vankilatyyliin kaltereineen kaikkineen. Matkamuistoksi Långholmenista voi ostaa vaikkapa tyylikkään raitapaidan tai hilpeän pallokahleen.

Ja kitara soi...

Aamiainen on päivän paras ateria – etenkin kun se tarjoillaan runsaana hyvässä seurassa parinkymmenen tuhannen älppäriin keskellä. Tämän elämyksen koimme lauantai-aamuna, kun kokoonnuimme ranetojen kanssa aamupalalle Mikke Englundin luokse. Mikke pitää asuintalonsa alakerässä levy- ja sarjakuvadiaria ja käyttää omaa asuntoaan myös myyntiartikkelien varastointiin.

Mikken luona saimme nauttia myös musiikillisia herkkuja. Kaksi kolmasosaa Persone-bändistä eli Martin Wiese ja Bertilo Wennergren antoivat kitaroiden soida ja äänihuulten väristä. Akustisessa kotikonsertissa kuultiin sekä vanhaa että uutta tuotantoa. Pitkällisen suostuttelun jälkeen myös kaksi neljäsosaa Dolcxamarista tarttui kitarihin. Patrik ”Pieçjo” Austin ja Mikko ”Sarçjo” Saarnio esittivät yllättäen suomenkielisen kappaleen. Tuomari Nurmion ”Oi mutsi, mutsi” soi fiiliksellä.

Voitokasta keilailua

Loppuhuipennukseksi Tukholman matkallemme isäntämme olivat varanneet muuttaman radan paikallisesta keilahallista. Hallissa käytiin ensimmäinen virallinen Pohjanmeren esperantokeilailun Suomi-Ruotsi-maaottelu. Radoilla nähtiin hyvin mielen-



Sarçjo kaj Pieçjo kantas ‘Oi mutsi, mutsi’.



Jukka keglolude.

kiintoisia keilaustyylejä niin isänniltä kuin vierailtakin.

Suomalaiset voittivat joukkuemestaruuden ja osoittautuivat varsinaisiksi keilataitureiksi myös yksilösuorituksissa. Lasketaan tulokset sitten keskiarvon mukaan tai parhaan sarjan perusteella, ykkönen oli Mikko Saarnio. Keilamestari aloitti pelin tokaisemalla: ”En oo ennen keilannutkaan. Mitäs mun nyt pitäis tehdä?” Kun jutun juju selvisi Mikolle, tulikin täyskaatoja niin, että lähes laskuissa seottiin. Viiden parhaan keilaajan joukkoon ylsivät myös Jukka Vajärvi ja Maikki Kettunen. Ruotsalaisista keilaradalla loistivat Bertilo Wennergren ja Per Aarne Fritzson.

Mukavaa pidettiin toki myös menen tullen laivamatkoilla. Fejolaisia nähtiin ravintolassa, diskossa, verovapailla ostoksilla ja karaokessa. Keskustelut olivat aika ajoin vilkkaita ja syvällisiäkin.

– Matka oli mukava. On hienoa, että kuvioissa on nyt mukana paljon uusia ihmisiä, toteaa noin kuusi vuotta FEJO:n toiminnassa mukana ollut Hanna Helen.

– Hauska porukka vetää mukaan ja esperanto viehättää kielenä, kiteyttää Hanna FEJO:n vetovoiman.

Teksti: Katja Lampinen

Respondo al Anna-Liisa Ali-Simola

Kara Anna-Liisa,
Mi bedaŭras, se la KEF-karikaturo vin tiom ĝenas kaj ofendas.

La karikaturo bildo de Arnau Torras estas desegnita speciale por KEF. La ĉefkarikaturo en la bildo estas fakte ne Kalevala, sed la virino en la bildo. Kaj mi fakte kuraĝas supozi, ke la karikaturo iom rilatas min persone. En la frua planfazo de KEF, mi duon-serioze ludis per la ideo okazigi iun poetan aŭtoran horon lige al saŭno aŭ eĉ en la saŭno mem. La frenezeta ideo venis de unu el la KEF-poetoj mem. Ankaŭ Arnau Torras konis ĉi tiun planon.

En KEF ni, malmaturuloj, cetere organizis prelegserieton pri finna literaturo por ĉe-estintaj katalunoj kaj alilandanoj. La partoprenintoj aŭdis i.a kurtajn prezentojn pri Aleksis Kivi, Edith Södergran, Muminvalo kaj – surpriz’, surpriz’ – pri Kalevala. Pri Kalevala prelegis mi mem, tamen ne en saŭno. Tiu bonega kaj altestimata libro estas ne nur por mi tre ŝatata kaj bone konata, sed ankaŭ parto de miaj universitataj studoj. Kaj mi asertas, ke ankaŭ al nia cetera KEF-junularo ĝi estas tre konata. (Cetere, antaŭ ne longe rondeto da FEJO-anoj faris ekskurson al finnugra festivalo por aŭdi tie i.a kalevalan poezideklamadon...)

Tamen, jes, plaĉegas al mi ne nur Kalevala, sed ankaŭ la bildo de Arnau. Ĝi estas karikaturo, ĝi estas humura, ĝi estas bonega, ĝi estas trafa kaj desegnita per certa speciala amo kaj tenero al Finnlando. En la bildo oni povas eĉ trovi la ĉefajn kalevala-ajn heroojn Väinämöinen, Ilmarinen kaj Lemminkäinen – Lemminkäinen ja estis speciale virinema kaj amorema – kaj la kernan ideon de Kalevala: Viroj (vane) serĉas virinon.

Karakterajo de junulara kulturo estas provoki, rompi tabuojn, tŭsi ”sanktajn temojn” kaj karikaturi. Al sekso ni havas pli leĝeran kaj senpudoran rilaton ol via generacio. Ni facile parolas pri la temo ĉe bierglaso kaj duonnudaj aŭ plennudaj korpoj ne ŝokas nin. ”Kial Esperanto ne interesas junularon?” estas ja tre ofta demando kaj lamento en niaj renkontiĝoj, kie junularo efektive mankas. Unu klara kialo jen: Ĉar Esperanto ofertas por ili malmulton vere interesan. Preskaŭ mankas en Esperanto la normala junulara kulturo, aferoj, kiuj altirus junularon. La junularo legas komiksojn (Tamen ne nur), iras kinejen kaj diskejen, auŝkultas rokon, popon, hiphopon, repon. Ilin ne nepre interesas kantado de himnoj kaj diapozitivoj pri iamaj kongresoj kaj lingvistikaj debatoj kaj zamenhofaj strategioj. Aŭ ne nur.

Mi finu per ekzemplo: Printempe mi havis kurson por kelkaj junaj muzikistoj en nia oficejo. Surbretare aperas vasta kolekto da Esperantolehti. Ilian atenton magnete kaj tuje kaptis unu nura ekzemplero: Tiu kun la ”fia” komiksa bildo surkovrile. ”Hej, ĉu ni rajtus havi unu ekzempleron?”. Eble la komiksoj de Arnau ne pliigas la membrokvanton pensiulan. Sed junulara kulturo altiras junularon.

Vi kompreneble rajtas malŝati aŭ eĉ abomeni la bildojn de Arnau Torras. Sed mi petas toleremon.

*Riitta Hämäläinen,
KEF-organizanto, sufiĉe juna,
eterne malmatura,
sed pasia amanto
kaj de Kalevala
kaj de komiksoj de Arnau Torras*

NEEKERI-sanan käytöstä

Esperantolehden numerossa 6/2000 oli juttuni, jonka yhteydessä käytin neekeri-sanaa. Kirjoitin sanan tietoisesti. Päätoimittaja kuitenkin muutti sanan muotoon ”tummaihoisen”. Toimittaja tietysti huolehtii, että lehdeillä säilyy linja, mitä hän pitää oikeana. Olkoon näin lehdessämme, varsinkin kun toimittajalla on tukenaan kielitoimiston kanta. Mutta olen kuitenkin eri mieltä!

Eräissä artikkeleissa kielitoimiston ihminen perustelee kielteistä kantaansa neekeri-sanalla käyttöönsä mm. sillä, että englannin kielessä se on halventava sana. Mitä tekemistä englannilla on tässä asiassa? Suomessa puhutaan sentään vielä suomenkieltä. Asenne paljastaa, että kielitoimistokin on rähmällään englannin kielen edessä. Tietoni mukaan esim. Ruotsissa ei koeta sanan käyttöä loukkaavana. Ilmeisesti Ruotsissa kieli-identiteetti on vahvemalla pohjalla.

Kielitoimiston kantaa noudattaen Suomessa poliisi kuulemma ei enää käytä kyseistä sanaa. Mielenkiintoista olisi tietää, miten poliisi kentällä ilmaisee, että kysymyksessä on neekeri! Tummaihoisen? Tässä tapauksessa menee mustalaiset, somalit ja neekerit ym. sekaisin. Afrikkalainen? Maanosassa on myös syntyperäisiä valko-ihoisia ja somalitkin ovat afrikkalaisia. Ainoa selvä ilmaisu olisi ”negrin roturyhmän edustaja” tai ”alkuperäisen afrikkalaisen kaltainen mustaihoisen tai melkein mustaihoisen” erotukseksi esim. etiopialaisista. Ilmaisu ei ole sujuva. On totta ettei ihmisen

ihon väriä aina tarvitse mainita, mutta joskus se on välttämätöntä. Joka muuta väittää, hurskastelee.

Lisäksi, jos poistetaan sana neekeri, siinä katoaa samalla kokonainen käsite ihmisestä, jonka esi-isät ovat syntyneet Afrikassa ja jonka ihonväri on hyvin tumma. Lisäksi omassa Esperanto-kulttuurissamme sana negro ei ole loukkaava.

Kun kuulen sanan neekeri, en ajattele siinä mitään loukkaavaa. Päin vastoin mieleen tulee ensimmäiseksi uljasvartaloiset neekeriurheilijat television ruudulla.

Esa Lång

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2001**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
2	1.3	15.3	1.4
3	1.5	15.5	1.6
4	1.7	15.7	1.8
5	1.9	15.9	1.10
6	1.11	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat

Ulkopuoliset

mainostajat:

1/1 sivu 600 mk

½ sivua 400 mk

1/4 sivua 250 mk

Jäsenet:

1/1 sivu 300 mk

½ sivua 200 mk

1/4 sivua 125 mk

PS. Komiksalbumoj de Arnau Torras mendebblas ĉe UEA. Mi varme rekomendas ilin kaj por komencantoj kaj por progresintoj kaj por ĉiuj kulturemaj samideanoj.

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki



Esperantolehden yhteyskortti

Lahjatilaus _ / _ _ alkaen.

Lahjatilauksen saajan nimi ja osoite:

(Lahjatilauksen maksajan nimi ja os. kortin alaosaan)

Tilaukseni päättyy _ / _ _.

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Osoitteeni muuttuu _ / _ _ alkaen.

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Uusi osoitteeni on:

Kestotilaus _ / _ _ alkaen.

Tilaus _ / _ _ alkaen.

Tilaaajan, kestotilaaajan tai lahjatilauksen maksajan nimi ja osoite. Osoitetarran paikka:

Posti-
merkki

**Suomen
esperantoliitto ry./
Sihteeri**

**Siltasaarencatu 15 C 65
00530 Helsinki**

Seuraava numero ♦ Venonta Numero

Seuraava numero ilmestyy 1.4.2001. Jutut 15.3.2001 mennessä Aimo Rantaselle, os. PL 2, 40801 Vaajakoski, puh. (014) 261 438. Venonta numero aperos 1.4.2001. Artikoloj ĝis 15.3.2001 al Aimo Rantanen, adr. PL 2, FI-40801 Vaajakoski, tel. (014) 261 438.